Francilia federacio
KomitatKunsido (KK) 12/01/2024

Partopreno

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier (PG) vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France ĉeestas
- Marc Giraud (MG) prezidanto ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) vic-sekretario ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) malĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison (DL) kasisto ĉeestas
- Kévin Morel-Fourrier (KMF) malĉeestas
- Laure Patas d'Illiers (LPI) sekretario ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) vic-prezidanto donas sian povon al PG
- Guillaume Vera-Navas (GVN) malĉeestas

Ekde la antaŭa kunsido

- 15/12/23 okazis KomitatKunsido, la protokolo estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
- 16/12/23, ZamFesto organizita de la fervojistoj (https://eventaservo.org/e/18abf5) Ni iomete partoprenis. Ni donis 100 €, la emblemo kaj nomo de nia asocio videblis sur la afiŝo, LPI kaj PG prizorgis la bufedon, la profito estis 20 €. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 homoj, inter ili kelkaj membroj de nia federacio. Venontjare la fervojistoj ne plu organizos (vidu sube).
- 17/12/23, ZamFesto organizita de la pariza grupo de SAT Amikaro. Partoprenis membroj de la nia federacio.
- 02/01/24, vizito de Maycon Fernandes (el Brazilo) kun sia edzino, en nia sidejo. 6 homoj, ĉefe membroj de nia federacio, babilis kaj manĝetis kun ili.
- 06/01/24, Reĝkuko en nia sidejo. Venis 19 homoj. Prizorgis AL kaj LPI. La kosto estis 122 €. Dum la evento ni varbis por aliĝi al Espéranto France (do al nia federacio) kaj kandidatiĝi al nia komitato.
- MG kaj LPI sendis mesaĝojn al membroj kaj amikoj por deziri bonan novan jaron, instigi al (re)aliĝo, instigi al kandidatiĝo en la komitaton. Ili sendis bondezirojn al aliaj esperantaj asocioj (Espéranto France, JEFO, fervojistoj, SAT Amikaro, asocio de Romo) kaj al la respondeculo pri asocioj en Paris Centre.

Kandidatoj al la komitato

La nunaj komitatanoj devas anonci ĉu ili rekandidatiĝas.

- RC NE
- PG JES
- MG NE
- DJ JES
- AK JES
- AL JES
- FLJ JES
- DL JES
- KMF NE RESPONDAS
- LPI JES
- MP NE
- GVN JES

GRAVE: nur 8 komitatanoj rekandidatiĝas. Laŭ nia statuto, la komitato devas enhavi inter 9 kaj 15 membrojn. Necesas trovi almenaŭ unu plian! Eĉ se ni havus sufiĉe da kandidatoj, ni invitu pliajn homojn kandidatiĝi. LPI sendos mesaĝon al la listoj, insiste petante kandidatiĝon. Komitatanoj ne hezitu proprainiciate kontakti eblajn kandidatojn!

Ĉiu komitatano kiu rekadidatiĝas sendu koncizan sinprezenton al LPI. La limdato estas 31/01/24. Vi povas kopii/modifi vian lastan sinprezenton https://esperanto.paris/IMG/pdf/sinprezentoj-2023-1.pdf

La novaj kandidatoj devos sendi sinprezenton al LPI, la limdato estas 04/02/24.

Atentu: necesos trovi novan prezidanton kaj novan sekretarion post la ĜA 2024.

Ĝenerala asembleo (ĜA)

Dato, loko

La ĜA 2024 okazos la 16an de marto de la 10a ĝis la 12a matene. Ĝi okazos surloke. Homoj kiuj ne kapablas veni al la sidejo povos konektiĝi per reta salono fare de MG.

Voĉdono

La membroj voĉdonos antaŭ la ĜA por aprobi la raportojn agadan kaj financan kaj por elekti novan komitaton. Ĉu plia(j) voĉdono(j)? Neniu decido dum la kunsido.

Balotado

La membroj kiuj havas retpoŝtadreson en la datumbazo Arthur de Espéranto France voĉdonos rete per balotilo.org. La reta baloto finiĝos la 15an de marto je 00h, t.e. la 14an vespere. La malmultaj (malpli ol 5) membroj kiuj ne havas retpoŝtadreson voĉdonos poŝte. Ili devos sendi tiel ke ilia koverto atingu la Ĉerizejon plej malfrue la 15an de marto matene. La rezultoj estos kalkulataj la 15an de marto kaj publikigataj la 16an de marto komence de la ĜA.

Tagordo

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: (mal)aprobo de la 2 raportoj, elekto de nova komitato, aliaj voĉdonoj se ili ekzistas
- prezento de la agadplano por 2024, peti ideojn kaj helpon por nunaj aŭ novaj projektoj

Preparo de la dokumentoj

- Invitilo oficiala kun tagordo kaj praktikaj detaloj (ekz reta ligilo): redaktota de LPI kaj MG
- Agadraporto 2023: redaktota de MG
- Agadplano 2024: redaktota de MG (ne sendota)
- Financa raporto 2023: preparota de DL kaj PG
- Balotilo, listo de kandidatoj kaj sinprezentoj: preparota de LPI

Atentu: ĉiuj dokumentoj estu pretaj **antaŭ la 10a de februaro**. Tiam la estraro validigos ĉiujn dokumentojn rete antaŭ la sendo.

Sendo de la dokumentoj

- La 2 raportoj kaj la sinprezentoj estos disponeblaj en la retejo esperanto.paris
- Al ĉiu membro kun retadreso ni sendos mesaĝon kun: oficiala invito, ligilo al la 2 raportoj kaj sinprezentoj, informo ke la retejo balotilo.org sendos mem individuan ligilon por voĉdoni
- Al la membroj sen retadreso ni sendos poŝte: oficialan invitilon, la 2 raportojn, liston de kandidatoj kun sinprezentoj, paperan balotilon, 2 kovertojn por voĉdoni poŝte

LPI sendos ĉion plej malfrue la 16an de februaro.

Al la homoj, kiuj aliĝos inter la 16a de februaro kaj la 15a de marto kaj havas retpoŝtadreson, LPI sendos la saman mesaĝon por ke ili povu partopreni la baloton kaj la ĜAn.

Programo de la tago

- 10h-12h: Ĝenerala Asembleo
- 12h-12h30: aperitivo donacata de nia asocio, prizorgos LPI kaj DL
- 12h30-14h: surloka tagmanĝo per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de ĉiuj ĉeestantoj
- 14h-17h: vizito aŭ promenado, ekzemple Jardin des plantes, PG esploros la aferon

Asekuro de niaj eventoj

Prizorgas DL. DL intencis kontrakti kun MAIF, krom se estas malplikosta eblo. Li demandos al Paul Quevy-Lefevre kiu asekuras Espéranto-France, por eble kontrakti kun la sama firmao.

Donacoj

Nia kasisto DL informas pri nia financa stato: ni havas 2 600 € en banko kaj 2 000 € en Arthur. Do eblas donaci.

DL proponas ke ni helpu la organizanton de Linguafest, kiu estis malprofita (vidu protokolon de KK 15/12/23). DL proponas mem doni kaj la federacio repagos al li. Pri 200 €, ni voĉdonis: 5 por, 1 kontraŭ, 3 sindetenoj. Decido pozitiva.

Ŝrankoj kaj arĥivoj

AL intencas retrovi niajn perditajn ludojn en la kelo en sakoj markitaj Michelle kaj ordigi nian ŝrankon, kie nun estas kaj fatraso kaj niaj arĥivoj (vidu protokolon de KK 15/12/23). (li faros tion la10an de februaro).

Pri niaj arĥivoj, ekzistas ebleco por ke ili estu profesie traktitaj. Pascal Dubourg-Glatigny preparas vastan projekton pri la arĥivoj en Francio. Nia asocio povas peti ke niaj arĥivoj estu inkluzivitaj en la procezo. Tamen ni atentu ke tio probable necesos ke iu membro de nia asocio laboru por prepari niajn arĥivojn: forigi duoblaĵojn, selekti, inventari. Tia laboro eble necesus uzi grandan tablon dum iom da tempo.

Nia reprezentanto ĉe Espéranto France PG informiĝu ĉe Espéranto-France pri la ebleco, la postuloj, la konsekvencoj.

Temo por voĉdono dum la ĜA: ĉu ni preferas ke niaj arĥivoj estu prizorgitaj en Francio de *Archives de France* aŭ en Vieno kun la arĥivoj de UEA?

Venonta ZamFesto

La du respondeculoj de la ZamFesto ĉe la fervojistoj ne plu prizorgos ĝin. Ili proponis ke nia federacio anstataŭu ilin en la organizado. Tra iu korespondanto ĉe la fervojistoj, plu eblus senpage uzi ilian spektejon 19 rue Traversière, kondiĉe ke la spektaklo inkluzivu partojn luditajn de fervojistaj ne-esperantaj asocioj. Ili sciigis al ni ke ilia ZamFesto ne estas profitodona sed plej bone nulbilanca: enspezoj (vendo de loteribiletoj) = elspezoj (pago de la spektakloludantoj). La organizo de la loterio necesas kolektadon kaj stokadon de la lotaĵoj. La organizo de la spektaklo necesas rilati kun la fervojistaj ne-esperantaj asocioj. Ni konsciu ke al la ZamFesto organizita de la fervojistoj venas homoj ne nur el Parizo, sed ankaŭ el aliaj regionoj, ĉar la asocio de esperantaj fervojistoj estas tutlanda. Ĉu ni faru tiel?

Alia ebleco estas organizi Zamfeston en alia loko. La pariza grupo de SAT-Amikaro probable konsentus kunorganizi. Eblus peti salonon en Domo de asocioj, ĉu en Paris Centre, ĉu en la 13a distrikto. La celpubliko estus ĉefe la franciliaj esperantistoj do malpli granda. Ĉu plu loterio? La ZamFesto povus esti spektaklo far de membroj (skeĉoj, teatraĵo?) aŭ de esperantista artisto (kiu iom kostas). Ankaŭ eblus kunaj agadoj (kantado, dancado...). Ĉu pripensinda ideo?

PG sugestas organizi feston ne nur pri Zamenhof, sed pri minoritataj lingvoj, invitante homojn kiuj venus prezenti (muziki) en sia lingvo, kaj kunorganizi kun Mundolingua.

DL sugestas plu organizi en la salono de la fervojistoj.

RC konsentas enketi pri la afero, kun helpo de la komitato, la fervojistoj kaj SAT-Amikaro.

Ĉu temo por voĉdono dum la ĜA? Ĉu alvoki dum la ĜA por trovi volontulojn por kunorganizi?

Esperanto 94

Restas nur unu vivanta estrarano. Ĉu la klubo pludaŭru?

En la departemento 94 ekzistas membroj de Espéranto France (LPI povas doni la liston): en 2022-2023, 15 homoj aliĝis kaj por 2023-2024 8 homoj jam realiĝis. Tial eblus revigligi la klubon se iu pretus aktivi pri tio.

Se neniu deziras revigligi la klubon, necesas fermi ĝin.

La mono ne plu estas en la banko sed nun estas en Caisse des dépôts. Estus pli facile rehavigi la monon se la klubo plu funkciu almenaŭ iomete da tempo kun kelkaj surlokaj membroj. Por tio necesas krei protokolon de ĜA subskribita de la restanta estrarano. Se eblas, la mono devas esti ĝirita en la konton de nia federacio, se restas iom post pago de ŝuldoj. La havaĵoj de la klubo (libroj, arĥivoj, fatraso) devas esti ordigitaj, la libroj devas esti alportitaj en nian sidejon, la arĥivoj eble inkluzivitaj en la vasta projekto pri arĥivoj (vidu supre).

Prizorgas AL, FLJ kaj Sylviane Lafargue.

Projektoj

- Nanterre, prezento de Esperanto, iam en februaro: PG, eble kun FLJ
- Foiro pri matematikaj ludoj: FLJ

- La junularo sendepende organizas siajn agadojn, raportas AL
- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn kaj disdoni librojn: MP ne havas tempon, la projekto estas ĉesigita
- Subglasoj: GVN
- Svisa asocio intencas krei paperajn tablotukojn, ĉu ni kuniĝu kun ili? DL
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL ekkontaktis novan respondeculon pri kulturaj aranĝoj, LPI
- Civitaj servistoj: Espéranto France decidis ne dungi civitajn servistojn ĉi-jare en Parizo, sed Christine Raiffaud denove lanĉos la aferon en aprilo 2024.

Respondeculoj pri agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Junulara babilrondo: AL kaj Julien, okazas ĉiumonate kontentige
- Junulara renkontiĝo en Denfert Café: Briac Millon kaj Loïc Morvan, ne regula evento
- Ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN, okazas ĉiumonate kontentige
- Espéranto café croissant: GVN, plu okazas sed ne plu ĉiumonate
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier okazas ĉiumonate
- Prelegturneoj: FLJ, ne okazis, eble denove okazos

Notu bone 1a: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2a: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon mem de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

Respondeculoj pri informkanaloj

Memorigo

La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook MG DL MP https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG (AL) https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo MG DJ FLJ MP https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL
- Vacapo: AK https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3

Venontaj kunsidoj

ĜA: 16/03/2023 10a-12a matene

KK: la novelektita komitato elektu la novan estraron: 22/03/23 je la 7a ptm kaj duono, mikse

FINO DE LA KK